

& Balado pri Pineli:

< Rekante 25 el 73 batoj por strofo, entute 657 paŝoj dum 4 minutoj. Verkis kaj komponis? El itala tradukis? Gianfranco Molle. Baladigis Martin Strid (2015) per nova rekantaĵo kun melodio.>

(#Melodio:

(So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /re di re /re so fa /fa mi i /i; So do /mi mi mi /mi fa so /la so o /o; fa mi /mi re mi /so fa Ti /do o o /o;

(#Rekantaĵe: Sodo /mi mi mi /mi re; mi /fa fa fa /fa mi; fa /so so so /So La; TiTi /do do do /do Ti i)

)×9)+

(&Strofoj:

'1 En Mi/lan' estis /varma ves/pero/ ;
Estis /varma, tre /varma ve/tero/ ;
"Kapo/ralo, mal/fermu fe/nestro/n" ;
Eta /puŝo: Pi/neli ne /plu/.

(×:; **Kama/rado Pi/neli ha/zarde
ŝan/celis ; fe/nestron el/falis,
kapo/ralo fa/talis.)**

'2 "Policestro, mi estas senkulpa ; Mi
jam diris kaj ade rediras ; Anarĥio
signifas ne bombojn ; Sed justecon en
la liberec".

'3 Ne fabelu, kulpulo Pineli ; Via kara
kunulo konfesis ; Nur pro li la atenco
sukcesis ; Kaj helpinto ja estas nur vi.
.....

'4 Vi mensogas alkrias Pineli ;
Kamarado ne ĵetis la bombon ; Ĉar
farintoj de ĉi-hekatombo ; Estas
mastroj kaj ne proletar'.

'5 Nu, atentu, kulpulo Pineli ; Ĉar ĉi-
ĉambro jam plenas je fumo ; Se vi
pluas jen estas fenestro ; Kvar etaĝoj,
ne temas pri ŝerc'.

'6 Oni murdis lin ĉar kamarado ; Kaj ne
gravis de li senkulpeco ; Anarĥio de
krim' estas speco ; Diris fia polic-
komisar'.

'7 Post ĉerko tri mil kamaradoj ; Hisas
alten batalan ni flagon ; Ĉi-vespere jen
estas la ĵuro ; Ke ne haltos tiele la lukt'.
.....

'8 Policestro kaj kunpolicanoj ; vi
mortigis al ni kamaradon ; Nur por kaŝi
ŝtatan masakron ; Sed plej akra de ni
estos vengĝ'.

'9 En Milan' estis varma vespero ; Estis
varma, tre varma vetero ; Kaporalo
malfermu fenestron ; Eta puŝo: Pineli
ne plu.)